Martin Gotthard Schneider,

# Vivojn sep mi volus havi

*tradukita de Adolf Burkhardt*

Vivojn sep mi volus havi.
Kia beno, kia riĉ'!
Tio por deziroj ĉiuj
estus rava plenumiĝ'.
La unuan mi eluzus,
sxip-stiristo, kapitan',
por la vastan mondon vidi,
veli sur la ocean'.

En la dua vivo min en
cirko kovrus klaŭna vest',
kaj admirus ĉiuj min, dre-
siston de sovaĝa best'.
En la tria, politike
estus mi tre grava hom',
ĉiutage inter Moskvo
flugus kaj la Blanka Dom'.

Film-stelulo, kanzonisto
estus mi en vivo kvar;
ŝikajn aŭtojn, belajn inojn
mi posedus sen avar'.
Kaj por helpi la homaron,
en la kvina vivo mi
estus kuracisto fama
en tre alta pozici'.

Sesa vivo: ĉio nuna
estis nura bagatel'.
Kosmonaŭto mi fariĝos,
flugos inter lun' kaj stel'.
En la sepa vivo - nu, mi
kio povus esti plu?
Certe venos la ideo,
speciala, sen tabu'.

. . .

Vivojn sep mi volus havi.
Mi ricevis unu por
sole tiun ĉi travivi,
antaŭ ol ĝi flugis for.
Tiu unu, mia, nun, kun
ĝojo, trist', plezuro, dev' -
ke ĝi estu bona vivo -
jen sincera mia rev'.

*Traduko de la Germana poemo "Sieben Leben möcht ich haben" de* Martin Gotthard Schneider *(∗1930-04-26) en Esperanton de* Adolf Burkhardt *(pastro, ∗1929-04-10 – †2004-04-02).*

*Arg-962-1939 (2014-01-10 18:35:57)*

*Pri la tradukinto vidu la retejon* `http://de.wikipedia.org/wiki/Adolf_Burkhardt`.